



Esperanto en Danio

11-a jarkolekto • n-ro 2 • Aprilo 2004



Partoprenu la Esperanto-manifestacion
en Strasburgo! (vidu paĝon 24)

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16

✉ dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Bent Wiinberg (vicprezidanto)

Ina Schultz (kasisto)

Jytte Sunekær (sekretario)

Ole Blaust

Werner Madsen

Torben Svendsen

Anstataŭantoj:

Bent Jensenius

Ana Røssum

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 24 47 50 40

✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz

Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup

☎ 32 52 19 58.

✉ ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
10.08.2004**

Enhavo

Lande

Jarkongreso de DEA	4
Tagordo de la Ĝenerala kunveno de DEA	5
Jarraporto de DEA pri la agado en 2004	6
LA JARO	6
INFORMADO	6
INSTRUADO	9
LIBROSERVO	10
JUNULARO	11
EKSTERAJ RILATOJ	11
LOKA LABORO	12
MEMBRONOMBRO	16
KALKULAĴOJ 2003	16
La junuloj kunvenis	18
Esperanto en danaj gazetoj... 19	

Loke

Kopenhago.....	20
-----------------------	-----------

Monde

Prepariĝas la estontaj UK-oj 22	
Esperanto en la Uragano de Ideologioj	23
Esperanto-manifestacio en Strasburgo	24
Parlamentara venketo	25

Anonco

Kurso de Esperanto sur KD- romo	27
--	-----------

Semajnfina konversacia kurso

Kunlabore kun Sunda Esperanto-Agado kaj Dana Esperanto-Instituto, DEA denove aranĝas konversacian kurson, gvidotan de la sperta instruisto, denaska esperantisto **Peter Weide**.

Praktikaj informoj:

Dato: La semajnfinojn 3an-5an de septembro 2004

Kursejo: Anna kaj Erik Hansen, Risbjergvej 27, Risbjerg, 4291 Ruds-Vedby (Selando)

Tlf.: 5826 3195, retpoŝto: e-a-hansen@get2net.dk

La kursejo estas la privata kaj belega loĝejo de Anna kaj Erik. Ili havas 4-5 dultajn ĉambrojn por ni, do oni verŝajne devos tranokti kun alia partoprenanto.

Ni petas vin kunporti viajn litaĵojn. Ni esperas ke la kursanoj pretas kunhelpi pri la praktikaj aferoj.

Alveno: vendrede, la 3-an de septembro, de la 15.00 posttagmeze

Foriro: dimanĉe, la 5-an de septembro, posttagmeze.

Kursenhavo: konversacio kaj ekzercado de la lingvo. Oni konversacios nur en Esperanto. Bonvenaj estas ĉiuj daŭrigantoj.

Prezo: 350 kr. La prezo inkluzivas instruadon, restadon kaj manĝaĵojn.

Aliĝo: Kiel eble plej frue, pro la limigita nombro de dormlokoj – **nepre antaŭ la 1-a de aŭgusto 2004 al:**

Dansk Esperanto-Institut

Bente kaj Lars Kromann

Jensen

Tlf.: 5671 4651

Retpoŝto: lars.ev@get2net.dj

aŭ al:

Arne Casper

Tlf: 3920 6348 / 2140 8487

Retpoŝto:

arne-casper@email.dk

Lande

Jarkongreso de DEA

Programo

Sabate la 24-an de aprilo

- 14.00 “Sprogpolitik: hvilke utopier er realistiske?”
Prelego de dr. phil. Robert Phillipson en la dana lingvo
- 15.15 Kafopaŭzo
- 15.45 “Aktiva neŭtraleco - Humaneca Internaciismo”
Prelego de Birthe Lapenna
- 17.00 “Miaj praktikaj spertoj kiel enterpretisto en Bruselo”
Prelego de Eliza Kehlet (NB! Programŝanĝo!)
- 18.00 Paŭzo
- 18.30 Festmanĝado. Trinkajoj aĉetebblas je moderaj prezoj.
- 20.00 Distra vespero
Muziko de Jonas kaj Mathias Dalmose

Dimanĉe al 25-an de aprilo

- 09.30 Ĝenerala kunveno de DEA
- 09.30. Ĝenerala kunveno de DEJO
- 12.00 Lunĉo
- 13.00 Fino

Pri la bushoraro en Ålborg

Beadŭrinde en la nova bushoraro oni nuligis la haltejon ĉe la migrulhejmo. La plej proksima haltejo estas nun je la fino de linio 13 ĉe la pramo al la insulo Egholm. De tie necesas piediri 800 m. laŭ la bordo de Limfjorden por atingi la migrulhejmon.

Tagordo de la Ĝenerala kunveno de DEA

Okazonta dimanĉe la 25-an de aprilo, je la 10-a horo en la Migrulhejmo de Aalborg

1. Elekto de kunvena gvidanto
2. Elekto de protokolanto
3. Jara raporto
4. Jara kalkulaĵo de 2003
5. Laborplano de DEA 2004-2005
6. Propono veninta de la estraro de Esperanto Unuiĝo de Næstved:
statutŝanĝo:
Pkt. 9.3.2.kiu havas jenan tekston:
Der kan stemmes ved skriftlig fuldmagt
estu ŝanĝita al:
Der kan stemmes ved skriftlig fuldmagt, men hver deltager
kan højst have fuldmagt fra 3 medlemmer.
7. Elekto de prezidanto (Ileana Schrøder akceptas reelekton)
8. Elekto de du estraranoj (Bent Wiinberg, kiu ne akceptas reelekton, kaj Ole Blaust)
9. Elekto de 2 anstataŭantoj
10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto
11. Ĝenerala kunsido 2005
12. Eventualaĵoj

Jarraporto de DEA pri la agado en 2004

La jaro

Dum la jaro la estraro diskutis kaj decidis pri pluraj taskoj kiuj kunportis ŝanĝojn en nia enlanda agado: ni devis trovi novan lokon por la libroservo kaj la arkivo de DEA, alian presadon de nia revuo EeD, reorganizi la hejmpaĝon, kaj precipe fari strategian laborplanon surbaze de la plano de UEA por povi efike sekvi nian agadon kaj la rezultojn. Unu el la gravaj novaĵoj estis *la agnosko de esperanto kiel utila lingvo* por pli vasta rondo da personoj kiel aktive funkcia komunikilo inter popoloj de diversaj nacioj kaj lingvoj, fare de la Konsilaro pri Impost-finanĉoj al la Foduso por Esperanto-Domo, kiu estis oficiale agnoskita kiel publike utila institucio.

Grava estas ankaŭ la eksterlanda agado de kunlaboro kun UEA kaj kiel membro de Eŭropa Esperanto-Unio. Ni sekvis la laboron de la Komitato por eks-

perimentado de la Internacia Lingvo en EU kiu kunvenis la 7-an kaj 8-an de decembro en Bruselo, pere de nia reprezentanto Bent Holm.

La taskoj estas ĝenerale ege multaj, eĉ por la plilarĝigita estraro, sed feliĉe nin helpis ankaŭ unuopaj membroj ekster la estraro al kiuj ni estas ege dankaj. Ni esperas plivastigi la rondon de membroj kiuj volas kontribui helpante nin estontece.

Unu konkreta helpo estis la propono de Bent Holm kulabori kun DEA pere de sia unuiĝo ESPERTEL kaj granda internacia telefonkompanio ACN, pere de kiu kiel DEA-kliento la membroj povas ŝpari monon kaj samtempe subteni DEA. Tiu aranĝo povas kontribui al la ekonomio de DEA kaj la estraro varme rekomendas la membrojn apogi tiun projekton.

Informado

Esperanto en Danio

Gravaj ŝanĝoj rilate al nia revuo estis deciditaj de la novelektita estraro. La frontpaĝo ekhavis novan kapon kun verda stelo. La antaŭa redaktoro Jens S. Larsen

interkonsentis daŭrigi la laboron kune kun la novelektita redakcia grupo. Ni elektis novan pli proksiman danan presejon por faciligi la laborprocezon inter redaktoro, la redakcia grupo kaj

la estraro, kiuj devas fine zorgi pri ekspedo de la revuo al la membroj. Bedaŭrinde la sendokostoj plialtiĝis lastatempe ĉar la registraro ne plu donas monapogon, kaj la dana poŝto ŝanĝis la regularon pri sendado, kaj tio devigas la estraron mem zorgi pri la sendado. Ankaŭ ekonomie tiuj ŝanĝoj devigis nin daŭre pri diskuti novajn solvojn, interalie la decidon de produktado de nur 4 numeroj jare anstataŭ 5. Ni aspiras ke la enhavo estu varia kaj alloga kun enlandaj kaj eksterlandaj informoj kaj aliaj ampleksaj temoj.

La hejmpaĝo

Laŭ la artikolo en EeD 4/2003 p.7 la oficiala hejmpaĝo de DEA (www.esperanto.dk) antaŭe troviĝis ĉe la dana interreta provizanto (Internetudbyder) *DK-Net*. Tiun poste aĉetis la entrepreno *Tele Danmark Internet* (nun *TDC*). La kondiĉoj por la pago kaj uzado de la hejmpaĝo ĉe *TDC* estis neklaraj kaj praktike ofertis nekontentigajn servojn laŭ la nuna estraro de DEA. Ni trovis novan pli bonan solvon, kiu samtempe estis ekonomie akceptebla por DEA. Inter pluraj ni fine trovis kaj elektis *WEB Hosting*, ĉar ĝi plenumis niajn postulojn – kaj nia hejmpaĝo estis translokita al *WEB Hosting* meze de julio 2003.

Dum aŭtuno 2003 la estraro

de DEA formulis kaj akceptis novan strukturon kaj gvidajn principojn de organizado de la hejmpaĝo – tute konkorde al la informstrategio ankaŭ aprobita de la estraro de DEA (vidu EeD 3/2003). Sekve de tio la hejmpaĝo kompreneble estu aktuala, simpla, plaĉa kaj dinamika, sed estu asignita al nur unu ĉefrespondeculo, kiu respondecas al la estraro de DEA – kaj volonte kunlaboras kun la membroj aŭ helpantoj de DEA. Torben Svendsen estis elektita kiel respondeculo kaj redaktoro de la hejmpaĝo, kaj aŭtune li kune kun juna helpanto komencis la laboron renovigi kaj ĝisdatigi la tekstojn kaj la paĝ-stilon (layout) de la hejmpaĝo. Je la jarŝanĝo venis al ni jura postulo fare de dana entrepreno kun malpermeso uzi la specialan “e-signon” en la hejmpaĝo, ĉar ĝi posedas la rajtojn pri ĝi. Pro tio necesis por ni rapide forpeli tiujn “e-signojn” de la tuta hejmpaĝo – kaj ni do prezentis al la ĝenerala interreta publiko la novajn paĝojn en januaro 2004, inkluzive ampleksajn librolistojn de la Libro-servo de DEA, retversion de “Esperanto en Danio” kaj la kutiman revuservon de DEA

Sekve de la nova strukturo kaj politiko de la hejmpaĝo, la grupoj kaj kluboj ne plu povis mem alŝuti (upload) informojn al la

hejmpaĝo www.esperanto.dk, sed anstataŭe devas sendi ilin al la retredaktoro, kiu sekve metos la informojn sur la hejmpaĝon. Pro tio la muzikgrupo Esperanto Desperado deziris havi propran interretan provizanton, por pli bone kaj rapide mem ĝisdatigi proprajn dosierojn (filer). DEA ofertis per unufoja monsumo helpi al Esperanto Desperado havigi propran hejmpaĝon. Esperanto Desperado do nun havas je sia dispono propran domajn-nomon kaj hejmpaĝon ĉe www.esperantodesperado.dk kaj mem decidas pri ĝi.

Pro la kreskantaj problemoj de virusoj kaj spamado, ne eblas sendi aldonajn dosierojn per la retpoŝta sistemo en esperanto.dk – tiujn dosierojn oni sendu rekte al la retadreso de koncernaj personoj.

La nuna hejmpaĝo de DEA estas krompromiso inter la eblaj teknikaj kaj homaj faktoroj. Ni kompreneble deziras ke ĝi funkcii teknike rapide, altnivele kaj sekure, sed samtempe ankaŭ tiel relative simple, ke ĉiu ordinara membro de DEA, per redaktila programo (ekzemple Windows FrontPage), senprobleme povu prizorgi kaj aktualigi la hejmpaĝon.

Per EeD ni daŭre informos vin pri faktaj retstatistikoj, novaj

iniciatoj kaj servoj en nia hejmpaĝo.

EEU kaj Brusela Komunikadcentro (BKC)

Eŭropa Esperanto-Unio estas kunigo de la landaj Esperanto-asocioj en Eŭropa Unio. En sia agado la estraro de EEU estas kontrolata de 11 landaj asocioj. Eŭropa Esperanto-Unio funkcias kiel Eŭropa Komisiono de UEA, sed povas preni ankaŭ malpli neŭtralan pozicion ol la tutmonda asocio.

Kiel membro de EEU, ni kunlaboris kun Brusela Komunikadcentro (BKC) pri diversaj kampanjoj, dissendante tradukitajn tekstojn al diversaj instancoj. La Komunikadcentron estras Eŭropa Esperanto-Unio. BKC kunlaboras kun Esperanto-asocioj por instigi regulan gazetaran kaj informan agadon pri Esperanto kaj pri la lingva problemo. BKC sekvas la laboron de la Eŭropa Parlamento kaj informas la asociojn pri gravaj proponoj rilate al Esperanto.

Esperanto-Nyt

Ejnar Hjort raportas ke pro ekonomia helpo de la membroj kaj legantoj, eblas produkti 1200 ekzemplerojn de la danlingva revuo, kaj dissendi ĝin ankaŭ al ĉiuj danaj politikistoj kaj al la danaj EU-parlamentanoj.

Antaŭ la pasintaj balotoj al la EU-Parlamento li skribis al ĉiuj kandidatoj kaj petis iliajn opiniojn pri la lingvokaoso en EU, kaj pri Esperanto. Same li faros ĉi-jare, kaj raportos pri la rezulto en Esperanto-Nyt. Laŭeble ni estonte povos enmeti retan version de Esperanto-Nyt en la DEA-hejmpaĝon por disponigi ĝin al ĉiuj interesuloj.

Instruado

Kunlabore kun Dana Esperanto-Instituto DEA aranĝis konversacian kurson sub gvidado de Lars Forsman el Svedio. Krome la kluboj mem aranĝas kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj.

Ni kunlaboris kun Flandra Esperanto-Ligo okaze de la eldonado de KD-roma Esperanta kurso, kiu estas aprobita de ILEI.

Kurso en RUC: la sekcio por lingvaj studoj de la universitato de Roskilde montris intereson lerni esperanton kaj DEA laŭ la deziro de la universitato aranĝis 2-monatan kurson. La kurso komenciĝis la unuan de marto ĉi-jare. kun partopreno de 5 studentoj kaj 2 profesoroj, sub gvidado de Preben Bagger. Ni tre ĝojas pri tiu atingo, kaj esperas ke la intereso de RUC pludaŭros kaj ke ni povos aranĝi novajn kursojn.

Informaj flugfolioj

DEA presigis novajn flugfoliojn kiujn Kim Henriksen disdonis al la partoprenantoj de la Karnevalo en Kopenhago, kiu okazis en junio. Ni intencas presigi pliajn flugfoliojn celante atingi diversajn grupojn. La estraro ricevis plurajn taŭgajn proponojn kiujn ni volas realigi.

Dana Esperanto-Instituto

Raportas Lars Kromann:

Dum 2003 nur 26 personoj mendis provlecionon kaj petis informojn pri Esperanto. El ili 8 personoj aliĝis al iu kurso, same kiel en 2002. Entute estas 22 kursanoj, kaj el ili nur 3 personoj iukaŭze nun ne partoprenas la kurson, ekzemple pro malsano kaj forvojaĝo dum longa tempo. 5 kursistoj finis la kursojn, kaj ĉe la jarfino estas 14 kursanoj, same kiel je la jarkomenco 2002.

Kune kun DEA ni aranĝis semajnfinan kurson la 10-12-an de oktobro 2003 en Ruds Vedby, en la amika hejmo de Anna kaj Erik Hansen. Partoprenis 9 personoj sub lertega instruado de Lars Forsman el Karlskoga, Svedio, kaj ni laboris, festis kaj interparolis pri grandaj kaj malgrandaj aferoj. Ni intencas kaj

esperas fari similan aranĝon dum 2004 – certe ĉiuj novaj kaj malnovaj esperantistoj havu eblecon partopreni en nia kurso.

Ni eldonas 4 diversajn kursojn kun entute ĉ. 650 paĝoj kaj ni ankaŭ eldonis senpagajn kajerojn pri fonetiko, gramatiko (dana kaj esperanta) kaj vortolistoj, fakte ili estas malgrandaj vortaroj. Kaj kompreneble mi eldonas informbroŝurojn pri Esperanto kaj nia

Libroservo

Raportas Arne Casper:

Dum la somero 2003, post la forpaso de Ib Sunekær, la estraro de DEA deziris, ke Arne Casper prenu la respondecon de la Libroservo. Pro diversaj cirkonstancoj DEA ne pli longe povis disponi pri la ĝisnunaj ejoj, kaj la unua tasko estis transporti nian librostokon al nova loko. La transportado de ĉirkaŭ 3000 libroj estis granda kaj peza projekto – sed dank'al bonaj amikoj inter klubanoj en KEK, la libroj estis translokitaj, klasifikitaj alfabeto – kaj denove registritaj komputile.

Pli poste, post la reorganizo de nia hejmpaĝo www.esperanto.dk ni povis meti la stokliston sur la reton – kaj ili

movado, kaj pri niaj kursoj. Ni nur anoncas en la alternativa revuo “Nyt Aspekt” kaj ĝia hejmpaĝo, en Esperanto-Nyt kaj en la hejmpaĝo esperanto.dk.

Eble nia laboro en DEI iomete stagnis, sed ni kontribuas kun nia laboro, kaj pripensas eldoni specialan danan retkurson – espereble iuj helpos nin? Bonvenon!

nun estas je agrabla dispono al ni ĉiuj.

La vendado de Libroservo dum la jaro estis, pli-malpli kiel kutime, akceptebla sed tute ne impona; ĉu pro la televido kaj komputiloj, kiuj certgrade anstataŭas librojn por esperantistoj, oni nur povas diveni, sed la laboron kompreneble ankaŭ ne faciligas tiuj strangaj diferencoj de AVI-reguloj (moms) pri libroj en EU: 6% en Nederlando kaj Svedio, 11% en Belgio kontraŭ 25% en Danio.

Estonteco: jes, kune kun la estraro de DEA mi vidas horizonte novan vortaron/vortliston Dana-Esperanto kiu anstataŭos la vortaron de Grønberg el 1949.

Junularo

La junulara sekcio reaktiviĝis komence de 2004 post kelkjara stagnado, kaj ŝanĝis sian nomon al DEJO: Dana Esperanta Junulara Organizo. Fine de marto ĉijare estrarano Werner Madsen ĉeestis trejn-seminarion en Bruselo por junaj aktivuloj organizita de TEJO, kaj subvenciita de EU. Temoj de la seminario estis interalie: prezentado de la programo JUNULARO de la Eŭropa Komisiono kiu celas kunlabori kun la junuloj de Eŭropo kaj interesigi ilin pri politikaj aferoj, informoj pri Eŭropa Junulara Forumo, Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Junulara Fondaĵo, diskutoj pri Esperanto-agado, pri la maniero kiel funkcias amaskomunikiloj, vizito al la Eŭropa Parlamento, renkontiĝo kun membro de Eŭropa Parlamento Marco Cappato, prelego pri profesieca lobiado kaj trovado de kunlaborantoj kaj konkretigo de ideoj.

Nia sperto estas ke pluraj junuloj lernas esperanton pere de la reto, kaj sufiĉe ekmastrinte la lingvon, ili kontaktas la movadon, ĉar ili sentas la bezonon konversacii kun aliaj junuloj. DEJO ankaŭ havas bonajn kontaktojn kaj kunlaboras kun la svedaj junuloj en Sunda Esperanto-Agado.

Eksteraj rilatoj

La dana UN-unuiĝo

DEA estas kolektiva membro de la dana UN-unuiĝo kaj Ileana Schröder estas la oficiala reprezentanto. Ni interŝanĝas informilojn kaj deklarojn okaze de specialaj rimarkindaj aktivadoj.

Parlamenta agado

En marto DEA estis implikita en EU-parlamenta agado pri Esperanto, okaze de raporto pri tradukaj kaj interpretadaj problemoj kaŭzitaj de la prigrandiĝo de EU per 10 novaj lingvoj. Esence oni konsideris provizorajn procedurojn kaze ke la interpretada kaj traduka sistemo ne garantios striktan egalecon inter la lingvoj ekde la unua tago de pligrandiĝo. La itala parlamentano Gianfranco Dell'Alba faris plurajn pozitivajn menciojn pri la rolo de Esperanto kaj la enkonduko de neŭtrala pontlingvo por longdaŭre solvi la problemon. BCK instigis la eŭropajn esperantistojn reagi skribante al propraj naciaj parlamentanoj (membroj de la komisiono pri konstituciaj aferoj) por ke ili apogu la proponon, ĉar du germanaj deputitoj proponis forigi la mencion pri Esperanto "pro tio ke ĝi ne havas kulturon".

DEA skribis al la du danaj parlamentanoj membroj de tiu komisiono. Bedaŭrinde la du

germanaj parlamentanoj sukcesis forigi la mencion pri Esperanto en la komisiona voĉdono, per 14 kontraŭ 12. Post la balotado Dell'Alba diris ke la lobiado helpis kaj li dankis al la esperantistoj kiuj reagis al EP-anoj. Fine de marto dum la plenkunsido de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, oni definitive voĉdonos pri la raporto. Kaj ni denove skribis tiufoje al ĉiuj 16 danaj parlamentanoj kun la peto remeti la vorton Esperanto en la raporton.

Ni ricevis pozitivan reagon de dana parlamentano Jens-Peter Bonde (vidu la esencan parton de lia letero ĉi-apude), kiu voĉdonis por Esperanto en la unua voĉdono de la Komisiono pri Konstituciaj Aferoj. La voĉdonado en la Pleno okazis la 1-an de aprilo en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, kaj oni ja malak-

ceptis la amendon de Dell'Alba, sed la evento estas tamen historia, ĉar la unuan fojon la Eŭropa Parlamento en la pleno devis alfronti la temon.

Antaŭ la baloto en junio ni denove kontaktos la EU-parlamentanojn por havigi ilian opinion pri la lingva problemo en Eŭropo.

Kære Ileana Schrøder

Tak for din henvendelse om Esperanto. Jeg er fortaler for den sproglige mangfoldighed men også for øget interkulturel kommunikation. Til sidstnævnte ser jeg Esperanto som et vigtigt supplement.

Jeg kan oplyse, at jeg stemte til fordel for Esperanto i Forfatningsudvalget og at jeg fortsat vil gøre mit til at holde døren åben for dette sprog.

Loka laboro

Kopenhago

Raportas Jytte Sunekær:

La membronombro estas 60, kiu dividiĝas jene: 50 aktivaj, 5 familiaj, 4 pasivaj kaj 1 honora. La estraro kunvenis 5 fojojn. La komuna grupo SEA okazigis du laborkunsidojn: la 4-an fojon en Lund (marto) kaj la 5-an fojon en Malmö (novembro). Nia organo, Kontaktilo pere de PONTO aperis 7 fojojn entute. La ĉeno de

helpantoj: Karin redaktas, Sten kompilas, Helen desegnas, Jens kopiadas kaj Jytte elsendas nian PONTON.

Ĉiulunde ni kunvenas kune kun la fervojistoj. En la komenco kelkaj el ni laborkunvenis pri la anoncado, retbabilejo, kursoj kaj programoj. Ni ricevis retadreson al la klubejo.

Kurso por komencantoj printempe efektiviĝis. En la aŭtuno ankaŭ ekfunkciis pordaŭriganta kurso. Studgrupon Bent Wiinberg kaj Lene Niemann gvidis.

La jarkunvenon de DEA ni aranĝis, ĉar ĝi okazis ĉi tie en Kopenhago.

Eksterordinara kunveno: Marko Lins prelegis al ni pri la Brusela Komunikadcentro de EEU (junio).

Ni somerekskursis du fojojn. Ni vizitis la tramuzeon “Sporvejsmuseet Skjoldenæsholm” (julio), kaj laŭ invito de la klubo de Næstved ni vojaĝis al Fakse (junio).

UK en Gotenburgo, Svedio, multaj el ni partoprenis.

En januaro ni havis ges-rojn Fornal kiel prelegantojn. Kaj la turneanta Mikaelo Bronštejn el Rusio distris nin.

Næstved

Raportas Grete Nielsen:

En 2002 ni komencis la traduklaboron de kelkaj fabeloj de H.C. Andersen okaze de la 200-jariĝo en 2005. Tiun laboron ni daŭrigis en 2003. Ni ankoraŭ ne scias, ĉu kaj kiel ni sukcesos publikigi la rezulton, sed ni lernas multon dumvoje.

En januaro Frederik Eriksen prelegis pri Bunta Azio, en februaro Leo Schnoor pri Sankt-Peterburgo, en marto Lene kaj Jan Niemann pri Kamboĝo kaj en oktobro Sisse Gry Olsen pri Bolivio. Ĉiuj el tiuj monataj kunvenoj komenciĝas per komuna manĝado. Bente transprenis tiun taskon ekde la aŭtuno. Informado pri la prelegoj al gazetoj kaj radioj daŭre okazas elektronike kun kontentiga rezulto – laŭ la ricevitaj gazeteltondaĵoj ni ŝajne estas la sola klubo, kiu praktikas tion.

La somera ekskurso iris al la geologia muzeo en Fakse kaj poste al Værløse ĉe Bente kaj Lars.

En oktobro du el niaj membroj disponigis sian hejmon en Ruds Vedby al sukcesa semajnfina kurso kun Lars Forsman, Svedio, kiel studgvidanto. Estis komuna aranĝo de Dansk-Esperanto-Institut en Fakse kaj de DEA. Laŭ la opinio de la partoprenintoj ripetinda afero!

La poŝta reklamilo ‘Esperanto – et mellemfolkeligt sprog’ funkciis dum la tuta jaro, same kiel ĝi faras ĉi-jare.

‘Esperanto-nyt’ aperis nur unufoje. Ni sendis ĝin al pli ol 80 adresoj laŭ reviziita listo.

La Novaĵletero aperis 4-foje, la estraro kunvenis 4-foje, nombro de aranĝoj estis 17 kaj meza nombro de partoprenintoj 9,6.

La klubo havas 21 membrojn.

Vejle-Fredericia

Raportas Ebba Jensen:

En la pasinta jaro nia klubo havis 23 membrojn kaj kunvenis 4 fojojn.

La 15-an de marto okazis ĝenerala kunveno kun komuna manĝado, en la kunvenejo de la lernejo, Solsikkevej 4. Partoprenis 13 membroj. La estraro estis reelektita.

En majo, la 27-an ni ekskursis al la domo de Jacob kaj Minka, Hytten ĉe Vejle, kie ili gastigis nin. Partoprenis entute 11 membroj.

La 8-an de aŭgusto ni kunvenis kun germanaj esperantistoj de Hamburgo ĉe Tove kaj Egon

Bak en Kolding, kun la partopreno de 8 membroj.

En decembro, la 13-an ni aranĝis Zamenhoffeston kaj la tradician julemikon kun manĝado kaj ludoj en la lerneja kunvenejo. La feston partoprenis 11 membroj.

Nordjutlando

Raportas Ejnar Hjort:

La klubo organizis esperantokurson ĉiun semajnon, merkrede, dum la vintro. Ni esperas ke estonte ni havu ankaŭ aranĝojn kun eksterlandaj prelegantoj. La klubo havas 31 membrojn.

Århus

Raportas Stanisław Mielczarek:

En la pasinta jaro 2003, nia klubo iomete malpli nombriĝis ĝis 31 membroj. Ni perdis ankaŭ la honoran membron, Jenny Jørgensen, kiu mortis en oktobro 2003. Ĝenerale ni ne povas diri, ke Esperanto en Århus prosperas.

Ni havis en la jaro 2003 dek kunvenojn:

La 23-an de januaro la temo estis: “Mia laboro kaj mia pensio?”. La temo montriĝis tre interesa kaj instigis viglan diskuton. Tiun vesperon ĉiu el ni rakontis pri si mem, pri sia laboro, pensio, hobiaj ktp.

Montriĝis, ke inter ni estas junaj studentoj, kiuj krom la studado tre interesiĝas pri Esperanto, fervojisto, kiu riparis fervojojn, psikologo, kiu laboris en malliberejo, kuracisto ktp.

La 20-an de februaro okazis ĝenerala kunveno. Partoprenis 11 membroj. Bedaŭrinde la prezidanto ne partoprenis pro gripo. Okazis neniuj ŝanĝoj en la estraro. Same kiel en la aliaj kluboj, nia klubo devis “kontentiĝi” pri la “malnovaj” estraranoj, kiuj pretis daŭrigi ankoraŭ unu periodon.

Søren Dalmose deziris, ke ni havu du kunvenojn monate. Tion ni jam havis siatempe, ĉar pri tio petis fervojistoj, sed pro la manko de intereso ni rezignis pri tio.

La partoprenantoj ricevis informojn pri Revuoservo de Dana Esperanto, pri eblecoj aboni diversajn Esperanto-revuojn kaj pri UEA-kongreso en Svedio.

En marto, la 27-an: “Lingvo-problemo en Eŭropa Unio”. Tiun vesperon venis la prezidanto de la Aalborga E-klubo, Ejnar Hjorth, kiu tuŝis tre interese tiun tre aktualan temon, ĉar EU, kiu ampleksas 375 milionojn da homoj, baldaŭ fariĝos ankoraŭ pli granda. Membriĝos landoj kies lingvoj, popoloj estas iom pli “fremdaj” por ni okcident-eŭropanoj. Oni uzos 23 lingvojn kun 506 tradukkombinoj!

La 24-an de aprilo ni denove havis diskutrondon, plejparte por praktiki la lingvon rakontante pri iu kunportita objekto.

La 22-an de majo la temo de la kunveno estis: “Ciganoj en Pollando”. Stanisław Mielczarek enkondukis nin en la historion de romaoj ĝenerale. Li rakontis, ke romaoj (ciganoj) devenas el la norda parto de Barato. Ilia migrado al aliaj partoj de la mondo komenciĝis antaŭ pli ol 1000 jaroj. Oni nomas ilin diverse en diversaj landoj. Ili preferas, ke oni nomu ilin

“romaoj”. “Rom” signifas “homon” en la romaa lingvo. Tiu lingvo funkcias kiel iuspeca Esperanto por romaoj. Pro tio, ke ĝi estis nur parollingvo, ĝi estas diversa en diversaj landoj. Nur antaŭ nelonge oni komencis krei skriban lingvon.

La prelego estis ilustrita per foliogramoj kaj videoflmo.

La 7-an de junio okazis nia tradicia somera ekskurso. Inna Busck kaj Gert Pedersen el la Aalborga klubo aranĝis komunan ekskurson por membroj de niaj du kluboj. La vetero estis bela, tial des pli ni ĝuis la ŝipveturadon Hobro-Mariager-Hobro per malnova pramo “Svanen”.

La agrablan ŝipveturadon plezurigis muzikantoj: Gert Pedersen, Jonas kaj Mathias Dalmose. Ni ĉiuj estis treege kontentaj pri la ekskurso.

La 3-an de aŭgusto, survoje el Gotenburgo al Groningen vizitis nin du nederlandaj samideaninoj.

La aŭtunan/vintran sezonon ni komencis la 25-an de septembro, kiam ĉiu el ni rakontis pri sia ferio. Denove montriĝis, ke ni, esperantistoj, vojaĝas multe.

La 30-an de oktobro planis viziti nian klubon la nova prezidantino de Dana Esperanto-Asocio Ileana Schrøder. Bedaŭrinde ŝi malsaniĝis kaj ne povis veni. Ni improvizis do tiun ves-

peron parolante pri diversaj temoj.

La 27-an de novembro la temo estis: "Kio (kiu) instigis vin lerni Esperanton kaj ĉu vi kredas je ĝia estonteco?". Niaj vojoj al Esperantujo kaj opinioj pri estonteco de Esperanto estis diversaj.

13.12: Tradicia Zamenhof-festo kaj julemiko. Kantinte la kristnaskan kanton "Glade jul..."

ni ĝuis agrablan etoson trinkante varman vinon kaj manĝante benjetojn. Intertempe ni rememorigis la kreinton de Esperanto. Kompreneble ni ankaŭ aŭskultis Kristnasko-rakontaĵon.

Mi deziras elkore danki al ĉiuj niaj klubanoj por la bona kunlaboro en la jaro 2003 en la streboj por komuna bono kaj por Esperanto.


Membronombro


En 2003 DEA havis entute 210 membrojn.

Noll regnskab 2003

<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
4% af DEAs individuaj	-223,20	Gravsted	1105,00
Gave	-370,00	Overskud	<u>999,08</u>
Kursgevinst	<u>-1.510,88</u>		
I alt indtægter	-2.104,08		2.104,08

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	59.446,88	Egenkapital	-59.163,50
Amagerbank	492,50	Overskud 2003	-999,08
Debitorerl	223,20		
I alt	60.162,58	I alt	-60.162,58


Ileana Schrøder
Formand


Ina Schultz
Kasserer


Regnskabet er gennemgået og fundet i orden:

Lis Thune

Jacob Norfalk

21/3-2004

21/3-2004



DEAs regnskab 2003

<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>
Klubber kontingent	11.630,00
Individuaj 2003	4.780,00
Individuaj 2002	540,00
Gaver	800,00
Renter	4.816,15
Kurstab/-gevinster	<u>3.950,06</u>

I alt indtægter DEA 26.516,21

Indtægter Libroservo 6.614,01

I alt indtægter 33.130,22

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer fore.	88.228,38
Libroservo	37.287,40
UEA kontoen	148,30
Kassekonto	0,00
Amagerbanken alm.	9.796,59
Girobank alm.	<u>3.814,01</u>

139.274,68

<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
Administration	1.583,25
Porto	636,25
Gebyrer	1.975,26
Bestyrelsesmøder	67,50
UEA og EEUkontingent	4.119,20
Arrangementer	350,00
Årsmøde udgifter	-195,70
E. en Danio	17.226,02
Repræsentation	500,00
Kursdiff. m.m.	-24,56
4% til Noll	<u>223,20</u>

I alt udgifter DEA 26.460,42

Overskud DEA 55,79

Overskud Libroservo 6.614,01

I alt udgifter 33.130,22

<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Egenkapital primo	99.433,61
Årets overskud DEA	55,79
Årets overskud Libroservo	<u>6.614,01</u>
Egenkapital ultimo	106.103,41
Perspektivo	32.948,07
Kreditorer	<u>223,20</u>

139.274,68

Ileana Schrøder

Ileana Schrøder
Formand

Ina Schultz

Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden. Der er taget stikprøver af bilagene.

Lis Thune

Jacob Norfalk

Jacob Norfalk
2/3-2004

21/3-2004

Lis Thune

La junuloj kunvenis

Ĉirkaŭ novjaro mi partoprenis en la urbo Naumburg la faman IS, ĉiujara Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Hokan, juna sveda esperantisto, atentigis min ke estas tie kolektitaj ok danoj, do kial ne kunveni ilin? Do en la lasta vespero (la 3-an de januaro) kunvenis grupo da sep junaj danaj Esperantistoj por preparoli organiziĝon. Tie ĉi estas raporto pri la rezultoj.

Tuj aperis al mi du punktoj: la unua por informi kaj la dua por diskuti. La unua estis ke mi iros al trejnseminario por junaj europaj aktivuloj organizita de TEJO kiel reprezentanto de DEJO, kiu la lastajn jarojn estis nur surpapera junulara organizaĵo sen estraro kaj infrastrukturo. La dua temas pri organizado de danaj junaj esperantistoj: pli kaj pli da danaj junuloj utiligas Esperanton por ekzemple vojaĝi al renkontiĝoj. Ili estas fervoraj, regule venas novuloj,

sed nuntempe ili estas neorganizitaj kaj ne povas facile komuniki inter si. Mi klopodis komprenigi al la ĉeestantaj junuloj ke la vigleco de la Esperantojunularo estas tre bela evoluo.

Spite la argumentojn, kelkaj ne vidis la perspektivon de organiziĝo aŭ estis skeptikaj.

Mi do faris proponon pri kunveno kie oni povos elekti kvar tutlibervolajn estraranojn kuraĝaj preni titolon. Fine mi notis ke la ĉeestantoj havis dezirojn pri lokaj kontaktuloj (kiuj povu informi novulojn!) kaj deziron pri kunveno dufoje jare kaj pri DEJO-festoj.

La ĉeestantoj apogis la planon, elektis min kiel prezidanton kaj ni eĉ trovis kandidatojn por vicprezidanto, kasisto kaj sekretario. Mi estis ĝoja pri la sukceso de la diskuto kaj de la kunveno, kiu daŭris unu kaj duonan horon. Mi dankas al la ĉeestintoj por ilia partopreno.

Werner Hellesøe Madsen

Esperanto en danaj gazetoj

En la dana faka revuo por inĝenieroj kaj teknikistoj “Ingeniøren” aperis ĉi-jare la 27-an de februaro tutpaĝa artikolo kun la titolo “La Esperanto de la maŝina inĝeniero”. Temas pri teknika normo GPS (geometriaj produkt-specifigoj), kiu “estas por la membroj de la teknika komitato sub ISO tio kio estas Esperanto por lingvo-entuziasmoj”.

Laŭ la artikolo la realigo de la normo estus grandega avantaĝo en internacia komerco, sed nur se multe da firmaoj adoptos ĝin – ĝi do estas komparebla kun Esperanto kaj pozitive pro ĝia interna ecaro kaj negative pro la malfacileco tutmondi ĝin. La artikolo sufiĉe vaste prezentas Esperanton, ne nur GPS-n.

Okazas sufiĉe ofte ke oni komparas Esperanton kun sukcesa teknikaĵo, sed lastatempe la pastro Flemming Pless en la taggazeto Jyllandsposten la 8-an de marto parolis pri “la Esperanto de la animo”, nome kulturiteco (“dannelse”). Laŭ li la Internacia estas lingvo kiu distingiĝas per respekto, zorgemo kaj ĝentileco inter homoj. La tagon poste aperis ironia(?) komento en la bulvarda gazeto Ekstrabladet, kie oni instigis al Pless kontraŭbatali siajn kontraŭulojn tute senkulture, kvankam senperforte.

Sed jam ne sufiĉas paroli pri la Esperantoj de la tekniko kaj de la animo: En la altnivela semajngazeto Weekendavisen aperis la 2-an de aprilo notico pri la *socia* Esperanto. PEN Internacia ŝanĝis sian ĉarton tiel ke ĝi ne plu havas tiom da mencioj de la vorto “nacio” – kaj laŭ Weekendavisen tio signifas ke PEN nun laboras kontraŭ la aktualaj planoj reenkonduki literaturan kanonon en la dana eduk-sistemo, kvazaŭ tradukoj ne povus esti parto de kanono!

En sia jarraporto la dana PEN aprobe citas la devizon de la Esperanta PEN, nome “Ne la nacio estas mia lingvo, la lingvo estas mia nacio”. Ne malpli ironie ol Ekstrabladet, Weekendavisen komentas ke “Tio sonas kiel vera Volapuko, sed la intenco ŝajnas esti sufiĉe bona”.

Loke

Kopenhago

NB NB NB Komuna retadreso de la DEFA-klubo kaj KEK!
En la retbabilejo, kiu funkcias en la klubejo ĉiulunde, eblas nun por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson:

defakek@hotmail.com

Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

12/4 Pro pasko neniun kunveno

19/4 Rakontu pri iu vojaĝ-travivaĝo - eventuale kun kelkaj (ne multaj) fotoj/bildoj. Daŭro maksimume 5 minutojn, por ke ĉiuj havu ŝancon partopreni.

26/4 Pri la ĵus okazinta Dana Jarkunveno ...

3/5 Kim (kaj ni) ludos, kantos kaj dancos . .

10/5 IFK en Sopron - neniun kunveno

17/5 Pri la 56a IFK - partoprenintoj rakontos

24/5 Jan informos pri la Interreto kaj niaj ebloj eluzi la avantaĝojn de ĝi - informserĉado, interparolo skribe kaj buŝe ktp.

31/5 Pro pentekosto neniun kunveno

SOMERA EKSKURSO KOPENHAGO:

10/7 ni promenos 'En la spuroj de H.C.Andersen' tra Kopenhago kaj Amager. Ni kolektiĝos ĉe la ankro en Nyhavn. Kunportu lunĉpakajon kaj trinkaĵojn por propra konsumo.

Ŝanĝoj povos okazi.

Lene Niemann

La brazila “ĝangalulo” en Kopenhago



Flavio Rebelo de ITV kaj
Ileana Schrøder de DEA

La 25-an de februaro ni bonvenigis la ĉarman kaj efikan brazilan redaktoron de la retgazeto Ĝangalo, Flavio Rebelo en la Kopenhaga Kultura Grupo.

Li entuziasme rakontis pri sia nova projekto ITV (t.e. Internacia TeleVido), kreado de reta televida kanalo tute en Esperanto. Li opiniis ke por realigi la projekton li bezonas sumon de 35.000 eŭroj, kaj lia vojaĝo

havis celon varbi por monkolektado. La projekto ŝajnis al ni ĉiuj tre bona kaj realigebla kaj ni tuj komencis kolekti monon por la projekto inter la ĉeestantoj. Ĝis nun ni jam sendis pli ol mil eŭrojn al la konto de Ĝangalo ĉe UEA, kolektita inter dudeko da samideanoj.

Plenumo de la projekto certe estas ne nur revo de Flavio sed ankaŭ de ĉiu esperantisto: nia propra televido en nia propra lingvo! Se pli multaj el niaj membroj deziras partopreni en tia eminenta iniciato, bonvolu kontakti Arne Casper, arne-casper@email.dk. Por legi pli multe pri la projekto, vizitu www.gxangalo.com. Ankaŭ estas detala ekzameno de la ITV-projekto en la retrevuo Libera Folio (www.liberafolio.org).

Arne Casper

Studrondo en RUC

Dum marto kaj aprilo okazas 8 studsesioj pri Esperanto en *Kultur- og Sprogødestudier* (Kultur- kaj lingvorenkontaj studoj), sekcio de la Universitato de Roskilde, malfermaj ankaŭ al studentoj de aliaj partoj de la universitato. Oni ne nur lernos la lingvon, sed ankaŭ diskutos ĝiajn poeziajn potencialojn kaj la memkomprenon de la Esperano-komunumo. La studrondon gvidas Preben Bagger.

Prepariĝas la estontaj UK-oj

Meze de marto 2004 la nombro de aliĝintoj al la 89-a Universala Kongreso de Esperanto jam superis milon. Kiel konate, la ĉi-jara UK okazos en Pekino inter 24-31a de julio ĉi-jare. Venontjare okazos la 90-a UK en Vilnius, Litovio. La Litova Esperanto-Asocio jam nun estas treege aktiva eldonante librojn kaj montrante sin en la litovaj amaskomunikiloj.

Nun ankaŭ estas deciditaj loko kaj tempo de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto: ĝi okazos en Florenco (naciilingve Firenze), Italio, de la 29-a de julio gis la 5-a de aŭgusto 2006. Michela Lipari, respondeca estrarano pri la UK en Itala Esperanto-Federacio, raportas ke “certe temos pri tre zorge preparita kongreso”. La Landa Kongresa Komitato estas “sub la reĝisorado, en la rolo de sekretario, de Diccon Masterman, iama Konstanta Kongresa Sekretario ĉe UEA kaj poste estrarano de UEA pri kongresoj.”

(el revuo Esperanto)



Arkitektura detalo el Pekino

Esperanto en la Uragano de Ideologioj

Internacia Simpozio en Vieno

La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904–1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).

Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per “La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto”. Esperanto do ne estas io ekzotika kaj margena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jar-

cento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduki la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko – la cetero disvolviĝos en Esperanto.

Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj.

Partoprenkotizo: 50 €, por studentoj kaj lernantoj 35 €. Aliĝo per retpoŝto ĉe plansprachen@onb.ac.at

IEM

Esperanto-manifestacio en Strasburgo

Okaze de la tago de Eŭropo, dimanĉon la 9-an de majo 2004 okazos en Strasburgo manifestacio pri la temo de lingvoj kadre de la nova Eŭropa Unio.

La nomo de la manifestacio EŬROPA BUNTO, signifanta en Esperanto “eŭropa multkolorco”, celas montri, ke la diverseco de lingvoj kaj kulturoj en Eŭropo estas riĉeco protektenda.

Jen la programo de tiu tago:

- 9.00 Rendevuo ĉe la “Place de l’Université” de Strasburgo
- 11.00 Bonvenigaj vortoj de la organizantoj kaj de la delegacioj
- 11.30 Manĝo kaj pikniko.
- 12.30 Koncerto de JoMo (Jean Marc Leclere de Tuluzo, kiu kantas en pluraj lingvoj)
- 14.00 Starto de la manifestacio. Ne-rapida iro tra la “allée de la Robertsau” kaj “avenue de l’Europe”: parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj ktp.
- 15.30 Alveno al la “Orangerie” (apud la Eŭropaj Parlamentejo kaj Konsilio)
- 16.00 Mallongaj prelegoj de diversaj partoprenantaj asocioj. Fina parolado de grava eŭropa persono
- 17.00 Disiĝo de la manifestacio

Por informoj: Eŭropa Bunto
6 rue J-P Calloc'h
F-22000 St-Brieuc
Francio

Retadreso: europa.bunto@eraro.com

Parlamentara venketo

Pri la lastatempaj eventoj en EU raportas Renato Corsetti, prezidento de UEA:

La 1-an de aprilo 2004 oni voĉdonis en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo pri raporto pri la lingva problemo, kaj oni malakceptis amendon de Dell'Alba, kiu menciis Esperanton. La voĉdona sistemo estis per manlevo, kaj kiam la prezidento komprenas, ke estas klara plimulto, laŭŝajne, oni ne nombras la voĉdonintojn kaj raportas nur pri la malaprobo. Ni atendas pliajn informojn, sed estas klare ke la amendo ne estis akceptita.

Tio estis supozebla pro la rezultoj en la komisiono (14 kontraŭe kaj 12 pore), sed la evento estis same historia, ĉar la unuan fojon la Eŭropa Parlamento oni en la pleno devis alfronti la temon.

Mirinda estis la reago de EU-aj esperantistoj, eĉ supera je tio, kion mi mem atendis. En kelkaj landoj oni kontaktis ĉiujn unuopajn eŭropajn parlamentanojn. Mi scias pri Danlando, Francujo kaj Svedujo. Povas esti ke tio estis farata ankaŭ en aliaj landoj, pri kio mi ne scias. Mi rimarkis konsiderindan agadon en Britujo, Irlando, Germanujo kaj Italujo. Mi certas ke agado estis ankaŭ en Hispanujo kaj Aŭstrujo. Mi ne scias pri aliaj landoj, sed tio tute ne signifas ke agado ne okazis. Tio estas nur manko de informoj miaflanke kaj espereble aliaj kompletigos la bildon.

Ĉio ĉi montras, ke ni ne timas alfronti la plej altajn instancojn de EU, kaj ke ili, ne ni, estas en defenda pozicio. Frazoj de la speco: "Mi teorie favoras vin, sed oni devas agnoski, ke la angla...." ofte aperis en la respondoj de parlamentanoj. Ĝi ankaŭ montras, ke eŭropaj esperantistoj kiam ili devas agi rekte por Esperanto, povas kaj volas fari tion.

Ni ne forgesu, ke en kelkaj landoj okazas rektaj prezentoj de esperantistaj partioj. Neniu scias, ĉu ili pravas, aŭ ĉu ni pravas, kiuj preferas agi pere de la tradiciaj partioj. Neniu havas la magian formulon por triumfigi Esperanton. Ni ne forgesu, ke baldaŭ okazos granda tuteŭropa manifestacio en Strasburgo, kiu espereble signos novan puŝon de la agado por Esperanto en ĉi tiu kontinento.

Bondezirojn al ĉiuj ĉi tiuj iniciatoj. Ĉiu portas sian brikon aŭ sian rokegon. Estas tasko nia, de la Esperanto-organizaĵoj, kaj unuavice ĉi-kampe de Eŭropa Esperanto-Unio, gvidi la eŭropajn esperantistoj al tiaj agadoj. Mi aparte dankas la prezidanton de EEU, Sean O'Riain, kiu, malgraŭ siaj momentaj taskegoj en Berlino pro la irlanda prezidanteco de EU, partoprenis rekte la kampanjon per mesaĝoj en la irland-gaela al la irlandaj parlamentanoj kaj subtenis min, por ke mi agu iusence kiel oficisto de EEU aldone al la Brusela Komunikad-Centro, kiu daŭre sekvis la aferon surloke.

Pluraj konkretaj taskoj estas nun antaŭ ni en ĉi tiu kampo: la agado okaze de la eŭropaj elektoj (pri kiu baldaŭ vi ricevos indikojn de EEU tra la Brusela Komunikad-Centro), novaj leĝproponoj, kiuj estas nun pristudataj, kaj laste kontinenta referendumo, permesota de la nova eŭropa konstitucio, pri lingva libereco por ĉiuj lingvoj kaj por Esperanto en Eŭropo.

Mi ne povas ne mencii la esperantiston Ranieri Clerici, kiu estis la ŝlosila rilantanto kun la eŭropa parlamentano, kiu prezentis la amendon, kaj kiu nun estas pristudanta novan leĝproponon prezentotan al la nova parlamento post la elektoj. Ranieri estas tre modesta, sed eble baldaŭ li mem konsentos aperi publike.

Grandan dankon al ĉiuj agintoj! Vi redonis al mi la fieron esti ankaŭ-eŭropa esperantisto.



La Eŭropa Parlamento en Strasburgo

Anonco

Kurso de Esperanto sur KD-romo

Flandra Esperanto-Ligo (FEL), kies sidejo estas en Antverpeno, eldonis KD-romon en kiu ĉio pri Esperanto estas klarigita. La KD-romo enhavas interalie bazan kurson de 12 lecionoj, ĉiu konsistanta el 10-opo da ĉapitroj. Ĉiu leciono finiĝas per ekzercoj, kiuj kontrole povas esti sendataj al instruisto per retpoŝto. “Estas daŭriga kurso en formo de 25-ĉapitra detektivromano”, diras Dan Van Herpe, la proparolanto de FEL. “Subtene al la kursisto disponeblas kaj vortaro kun pli ol 50.000 vortoj, kaj vorttrejnilo kun proksimume 600 vortoj.

Dum sia 116-jara ekzistado la Esperanto-movado ege diligentis pri la propra kulturo. Tion pruvas ekzemple la originala literaturo, kaj proza kaj poezia, tradukoj al Esperanto de la Biblio kaj de verkoj de Shakespeare aŭ Tolkien. Ĉi tiuj tamen ne estas sur la KD-romo. Ili estas tro malfacilaj por komencantoj. Oni ja trovas pli facilajn erojn kiel ‘La eta Princo’, teatraĵon, iom da poezio kaj eĉ humuraĵojn. Kaj ankaŭ la muzikon oni ne forĝesis: kvin kantetoj en MP3-formato, ĉiuj verkitaj originale en Esperanto.

Finfine oni trovas kaj en la rubriko pri informado kaj en la TTT-ligoj ĉion, kion oni bezonas por pluorientiĝi en tiu movado. Por lingvo dume parolata de milionoj en pli ol 100 landoj, la interreto estas vera solvo. Tial la Esperanto-parolantoj dankeme uzas ĝin. Por iom helpi la Esperanto-parolantojn ekiri en la internacian mondon de Esperanto, kvar rabatkuponoj por internaciaj kunvenoj estas aldonitaj, same kiel kupono por 10-procenta rabato je ‘Monato’, monatrevo kiu informas pri politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj novaĵoj el la tuta mondo.”

Prezo: 115 dkr. – *La kovrilon de la kd-romo vidu ĉi-dorspaĝe.*

Oni povas aĉeti la kd-romon ĉe la Libroservo de DEA.

Arne Casper Tlf.: 3920 6348 / 2140 8487

Libroservo@esperanto.dk

Esperanto



Det har bestået i over 100 år, tales i mere end 100 lande, det er 10 gange hurtigere at lære end ethvert andet sprog, er politisk neutralt og dermed acceptabelt for alle.

“Grunden til at græsk, latin, fransk, engelsk eller svahili fungerer som verdenssprog, kunne også gælde Esperanto.”
Umberto Eco i bogen „Europa og det perfekte sprog”.

“Mit råd til alle, som har disponibel tid eller er villig til at beskæftige sig med bevægelsen omkring det internationale sprog, er: støt loyalt Esperanto.”
J. R. R. Tolkien


Esperanto er fornuftigt fordi det ikke kun er et sprog. Folk som er åbne mod verden og som taler esperanto finder let nye venner i ethvert land - gennem Internettet og e-mail, i klubben eller undervejs. Med rygsæk og esperanto rejser du (næsten) gratis over hele verden.



Forside



Eksempler på udtale



Esperantoaffabetet

Minimum systemkrav: Windows 95/98/ME/2000/XP, Pentium 100 Mhz, 16 MB RAM, 27 MB fri diskplads på c-drev, SVGA, lydkort, eventuelt mikrotfon.

ISBN 9058408817



9 789058 408815

Produktion: Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijkei 140
2000 Antwerpen

Distribution: CDline

www.cdline.be



Omfattende Esperanto-grundkursus

Esperanto

Omfattende grundkursus

Esperanto

Opdag de mangfoldige muligheder i det
INTERNATIONALE SPROG



Hele grammatikken på kun 12 lektioner

Gratis kursus-øvelsesdel

Fortsetterkursus i romanform

Ordbog og ordøvelser

Mere:
Musik
Litteratur
Esperanto tekstkontrol
Og mange informationer



Godkendt
af ILEI
(det Internationale Forbund
af Esperantolærere)



PC
CD
ROM